

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo

*Ne okazos elementa kurso, bedaŭrinde pro manko de lernantoj.



*Hama-Ronda Vespero

nov. 19 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 604

Temo: pri stereografiaj fotoj

lekcionto: s-ro Nanba Humiharu

ZAMENHOFA FESTO DE KANAGAŬA

La rondo en gubernio Kanagawa, inkluzive de nia rondo, okazigos Zamenhofan Feston jene.

dec. 10 (sab) 11h30-16h30

en La Urba Kultura Halo de Ĉigasaki, piede 8 min. de la stacidomo Ĉigasaki

kotizo: 800 enoj (200 enoj por studentoj)

JARFINA FESTENO

okazos post la regula kunsido

dec. 17 (sab) post 17h00

ĉe trinkejo "Sakana-no-kakurega Tukiakari"

baza pago: 4000 enoj

Raporto pri la Komuna Kongreso

La Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio okazis en Seongnam, urbo sude de Seulo, de la 7a ĝis la 9a de oktobro, sub la temo "esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro". Jenaj estas ĉefaj agadoj de niaj rondanoj.

*Budo de nia Hama-Rondo

La vendo de libroj kaj DVD sumis pli ol 30000 enoj. Ĝi estis zorgita ĉefe de ges-roj Doi Hirokaz kaj Doi Ĉieko.

*Fakkunsido de koruso

La korusanoj en la ferma soleno kantis "Saluton", kaj gvidis la kongresanojn kanti "La Tagiĝo". Tiu fakkunsido estis gvidita de nia rondano, s-ro

Makino Mitsuo. En ĝi partoprenis korusgrupanoj de nia rondo jene; s-inoj Murata Kazuyo, Torii Fusako, Imai Satiko, Kasai Makiko, Aoyama Atuko, Kanatu Nobuko.

*Libro-horo

En libro horo, inter alie s-ino Doi Ĉieko prezentis sian tradukon de "Silento", kaj s-ro Sibayama Zyun'iti sian tradukon de Miyazawa Kenzi.

*Giĉeto

S-ino Miyazaki Hideko kaj s-ro Suzuki Keiichiro helpis giĉetan akcepton de la japanaj aliĝintoj, alveninte al Koreio unu tagon pli frue ol la komenca tago.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS

*Internacia Festo de Jokohamo

En la 23a de okt. (dim), multaj civitanaj grupoj starigis tendon en la Parko Zoo-no-Hana kaj apelaciis pri sia agado, kaj ankaŭ nia grupo ekspoziciis pri Esperanto. La antaŭplanita dato, la 22a de okt., estis nuligita pro pluvo.

*Enkonduka seminario senpaga

En la 29a de okt. (sab) estis seminario, sed en ĝi ni havis nur unu ĉeestanton.

*Aŭtuna vojaĝo interkona

En la 30a kaj 31a de okt. (sab, dim), oni havis vojaĝon. Anstataŭ ekskurso al proksima loko, ĉi-jare 14 personoj vojaĝis foren al la varmfontejo en Sirabu, en urbo Yonezawa. La vojaĝintoj estis regalitaj de la gasteja estro kaj estrino, mem esperantistoj.

+++++

ESE0J

Blanka rozo

KOYAMA Takesi

Post la UK en Kopenhago Danio, Mi vojaĝis en Germanio kaj vizitis la urbon Munkeno.

En la 4a de aŭgusto mi vizitis la muzeon de fama aŭtkompanio BMW. En ĝi diversaj novaj belaj aŭtoj impone estis ekspoziciitaj, sed bedaŭrinde mi estas fremdulo por aŭtoj. Posttagmeze mi vizitis la universitaton Munkeno. En la fronta subtera halo mi renkontis prezentadon pri "Blanka rozo" kaj ĝi tre kortuŝis min, ĉar ĝis tiam mi tute ne sciis pri la tragediaj gestudentoj.

<Blanka rozo>

"Blanka rozo" estis malgranda grupo de rezistantoj el ĉefe studentoj de munkena universitato en Germanio. La Blanka rozo celis liberecon, kontraŭmiliton kaj kontraŭnaziismon. Ili kolektiĝis sekrete kaj diskutis pri situacio en Germanio kaj pri propagando al studentoj kaj civitanoj. Sed ĝi ekzistis en nur kelkaj monatoj dum 1942-1943, kaj ĉiuj membroj estis arestitaj kaj kondamnitaj.

La aktivaj studentoj estis H. Scholl kaj lia fratino Sophie. Ili preparis kaj disdonis 6 pamfletojn kontraŭ la Germanio de Adolf Hitler en suda regiono de Germanio.

La mizera afero okazis en la 18a de februaro 1943, gefratoj portis la valizon kun presitaj flugfolioj al la universitato kaj surmetis ilin en ĉefa koridoro por ke post la leciono la studentoj trovu ilin kaj legu. Sed antaŭ la tagmezo la staketo da folioj restis. La gefratoj ĵetis ilin de alta etaĝo en la korton. La fidela gardisto

observis ilin kaj tuj vokis la policon. Ili estis arestitaj per Gestapo.

Post 4 tagoj antaŭtagmeze la juĝado okazis kaj posttagmeze kondamnis gefratojn al mortpuno per gilotino. La verdikto estis plenumita la saman tagon vespere. La gefratoj aspirantaj al libereco estis ekzekutitaj pro disdonado de nur 6 flugfolioj kontraŭ naziismo.

Tio estis granda tragedio de junuloj kun puranimo en freneza periodo. La gefratoj estis malaperigitaj per sovaĝa naziismo antaŭ ĉirkaŭ 70 jaroj, sed iliaj spiritoj restadas/os longe en la universitato de Munkeno, mi kredas.

Poste la tiama juĝisto diris ke li nur plenumis sian laboron laŭ regulo. Oni plenumis/as/os sian laboron, kiu aplombe rabas, forprenas kaj subpremas alian vivon sen punkonscio laŭ sia grupa regulo aŭ reganto. Ĉu ne?

En 1982 oni produktis la filmon "Blanka rozo", sed bedaŭrinde mi ankoraŭ ne spektis ĝin.



germana poŝtmarko pri "Blanka rozo" en 1983

Senrjue pri Komuna Esperanto-Kongreso

SIBAYAMA Noriko

Ronkas iu en
fakkunsidej' malvasta.
Jen hund' blindula---



Inter kongresanoj troviĝis pluraj blinduloj, kaj unu el ili portis kondukhundon. Kiam ni aŭskultis lekcion kiel komenci podkaston, la blindulo kun sia hundo envenis kondukate de unu virino. Li okupis plej profundan sidlokon. Lia hundo kuŝis ĉe liaj piedoj, kaj ekdormis. Baldaŭ aŭdiĝis ronko. Mi unue suspektis la blindulon, sed ne. La deveno estis la hundo.

Li levas prezon
mem deklaritan ree.
Miras aŭkciant'.


En aŭkcio kelkfoje okazis, ke deklarinto mem plialtigis la prezon, kvankam neniu superis lin. Kredeble li pretervole elvoĉigis la prezon pli altan, incitate de ripetado de la prezo de la aŭkcianto. Esperantisto estas tiel bonkora, mi opinias.

“ Dankon!” --- eĥas voĉ’;
nov-akirita E-vort’
el butikkomiz’.

Dum ekskurso ni hazarde vizitis vendejon de marproduktaĵo. Ni gustumis marherbon kaj kelkaj el ni aĉetis ne malmulte. Mi atendis ekstere, ĉar mi ne intencis aĉeti tie. Tiam nia gvidanto iom hastis pro sekva programo, kaj li eniris en la vendejon por urĝigi aĉetontojn. Tamen li estis modesta viro kaj ne povis laŭte ordoni. Do, la komizo simpatie kriis en Esperanto, “Rapidu!”. Poste kiam ni forlasas la vendejon, la komizo ripetis al ni denove en Esperanto, “Dankon! Dankon!” ĝis ni malaperis antaŭ li.

Al surpodian’
malbone sidas tubseĝ’
en ceremoni’.

Malferma kaj ferma ceremonio okazis en aŭditorio, kie ni publiko sidis sur iom luksa seĝo, tamen komitatanoj sur podio sidis sur tubseĝo. Mi kompatis surpodianojn, kiuj devas toleri longan tempon sur ne tre agrabla seĝo. Dum la ceremonio mi hazarde vidis ke seĝo de mia edzo sur podio difektiĝas antaŭ publiko. La seĝo estis tuj interŝanĝita de najbaroj. Ĉu tiom li dikiĝis?



13a Nur-Esperanta Kunvivado en Jacugatake

Mizro Iwaya

En ĉiu aŭgusto okazas Nur-Esperanta Kunvivado, mallonge NEK, en Jacugatake. Ĉijara NEK estis la 13a, kiu okazis de la 20a ĝis la 22a de aŭgusto. Jen tiel longan historion havas tiu aranĝo. Tian longan vivon, laŭ mi, ebligis la ekzisto de nia propra hejmo, Esperanto-Domo de Yatugatake, mallonge EDY.

Mi jam delonge sciis la ekziston de NEK, sed ĝis nun neniam partoprenis en ĝi. Al mi ne plaĉas sanktaj predikoj de lektoroj, kiel okazas en diversaj seminarioj de Esperanto. Kompare kun ili, NEK ne havas oficialan lecionon, nek oficialan lektoron. La kunloĝantoj mem establas vivantan lecionon. Ni parolis Esperanton de mateno ĝis vespero, ĉar krokodilo estis strikte malpermesita en ĝi. Do, ni povas diri ke la vivo

mem estis esperantaj lecionoj.

Gravas la metodiko en tia okazo kiel paroligi Esperanton al la partoprenantoj. La organizantoj, s-roj Isikawa kaj Moĉizuki, rafinis la programon laŭ sia longa sperto de NEK, kiu resumiĝas en tri elementoj: grupa interparolado, komuna kunsido kaj variaĵo (ludo).

Grupa interparolado okazis kvar fojojn en du tagoj. Ĉiuj 16 partoprenantoj dividiĝis en kvar grupojn el kvar membroj, kaj babiladis laŭplaĉe dum 45 minutoj. Kvar ĉeestantoj estus adekvata nombro por ebligi al ĉiu liberan paroladon. La grupanoj ĉiufoje miksiĝis kaj rearanĝiĝis por ke ni havu ĉiam malsamajn grupanojn. Tial ni bone konatiĝis kun ĉiuj partoprenantoj.

Komuna kunsido okazis ĉiam antaŭ aŭ post la grupa interparolado. Prezidanto de la kunsido montras unu temon kaj ĉeestantoj esprimas sian opinion aŭ sperton pri tiu temo.

Variaĵo estas tempo por amuza distraĵo. Ĝi okazis en ambaŭ vesperoj kie ni prezentis nian "talenton" en diversaj fakoj: ekz. danco, pianoludo, kanto, k.a.

Mi vidis ke ĉiu parolis ĉiam Esperanton. Poste mi aŭdis ke en lastjaraj NEK oni emis

krokodili en la dua aŭ tria tago. Ĉu ĉijara estis do escepta? La arda atmosfero dum la kunsido estis karakteriza trajto de NEK. Sendependa ekzisto de EDY ebligis al ni liberan programon. Fakte ekzistis organizantoj, sed ili nur ordigis la procedon de la programo. Nenia gvido, nenia devigo. Oni diras ke ripetaj partoprenantoj multiĝis en lastaj jaroj. Tio signifas ke ili estis sufiĉe kontentaj pri la enhavo. Tio pravas la valoron de la kunvivado.



BELETRO

Tetrinkejo ĉe montokolo (Parto 4)

verkis Ogaŭa Mimei

esperantigis AIDA Kiyoshi



"Ĉu la varmeco de sakeo taŭgas por trinki?" La avĉjo enverŝis sakeon por la kamparano, kiu iomete klinante la kapon trinkis iom da sakeo. "Ĉu mi iom varmigos sakeon?" "Ĝuste taŭgas. Se vi ŝatus trinki sakeon, mi volus trinki kune kun vi. Mi bedaŭras!" "Ĉar vi tiel volonte trinkas sakeon, ankaŭ mi sentas feliĉa kvazaŭ mi estus ebria." Babilante intime la du rigardis tra malfermita ŝofio pale krepuskiĝantan montaron.

En la sekvanta tago abrupte ŝanĝiĝis la vetero. De la mateno blovadis frosta vento kaj neniŭ paŝis ĉi tien la tutan tagon. La avĉjo pli frue fermis la pordon. Ekstere la ĉielo ankoraŭ estis iom luma, sed kiam la domo estis lumigita, la interno fariĝis kvieta kiel profunda nokto. Tiam li aŭdis la frapetojn sur la pordon. Komence la avĉjo ignoris la sonon kiel venton kaj kiam li aŭdis pliajn frapetojn, li rimarkis, ke iu venis ĉi tien. La avĉjo atente alproksimiĝis al la pordo, ĉar venis al sia kapo la onidiro, ke vulpo aperos. "Pri kio mi povas servi al vi?" Li demandis laŭtvoĉe de la interno. "Pardonon, vi jam fermis la pordon" - iu virino respondis en milda voĉo. La avĉjo dubeme rigardis eksteren iom malfermante la pordon.

Tie staris juna virino kun knabeto. Ili aspektis kiel vojaĝantoj. "Hodiaŭ mi pli frue fermis la pordon, ĉar neniŭ plu venos ĉi tien." "Ĉu vi havas ion manĝeblan, bataton

aŭ persimonon?" - demandis la virino. "Jes, mi havas." La avĉjo klake malfermis la pordon. "Bonvolu eniri internen kaj iom ripozu. Kien vi iros?" - demandis la avĉjo. "Ni iros al iom fora vilaĝo. La trajno atingis la stacion malfrue kaj la celata loko estas fremda. Do ni venis ĉi tien serĉante la vojon. Survoje mi kuraĝigis mian filon dirante, ke mi aĉetos manĝaĵon por li, ĉar la filo apenaŭ povis marŝi antaŭen."

La avĉjo portis de la interno la batatojn kaj persimonon sur la pleto kaj enmanigis ilin al la virino. Li ankaŭ enmanigis manplenon da boligitaj kaŝtanoj sur la manplatojn de la knabo. "Vi estas laca pro vojaĝo, ĉu ne? Ankoraŭ necesas iom pli peno! La vojo al la vilaĝo estas tre bona. Iru al la vilaĝo kiel eble plej frue dum ankoraŭ restas lumo" - diris la avĉjo. Li pensis en sia koro, ke ŝi estis la edzino de la junulo el la vilaĝo, kiu loĝas en alia loko. "Mi kore dankas vin!" - diris la virino. Ŝi malaperis sur la krepuskiĝantan vojon en vento kondukante la knabon per mano.

La avĉjo, kiu forrigardis la virinon, rememoris, ke lia filo havas la edzinon en alia loko. "Ŝi eble vizitos min iam." Se tiam aŭtobuso trapasus ĉi tien, tio estus konvena. La komerco aŭ profito aŭ malprofito en liaj pensoj tuj forbloviĝis kiel falintaj folioj. Estus tre ĝoje, ke la mondo fariĝus hela. Li elkore esperis, ke multaj homoj fariĝos feliĉaj.

(fino)